# NOVAĴLETERO

Nr. 21

Juli-Aug. 1985

**Monata informilo de la Bruĝa Grupo Esperantista**
**Maandelijks informatieblad van de Brugse Esperanto-Groep**

**Ver. Uitg.: R. Rotsaert, Visspaanstraat 97, B-8000 Brugge**

**Lidgeld: 200 fr. per jaar op postrekening 000-0483533-85 van Bruĝa Grupo Esperantista, 8000 Brugge.**
**Steunende leden: 500 fr.**


## Buitengewone Algemene Vergadering

De leden worden uitgenodigd op de buitengewone algemene vergadering van de Brugse Esperanto-Groep, op zaterdag 14 september 1985, om 14 uur, ter Visspaanstraat 97, 8000 Brugge (bij Katelijnepoort; parkeergelegenheid langs Bargeweg).

Voorlopige dagorde:

- Kennisname ontslag voorzitter.
- Bestemming resultaat Markola Kongreso.

  (Voorstel: dekking mogelijk deficit van FLEJA-renkontiĝo te Loppem in november a.s.; daarna saldo voor abonhelpa fonduso van Monato.)
- Beslissing omtrent de toekomst van de groep.

  (Zie verder in dit nummer.)

~~Mat.~~ Michael Nolf

19h10 ... vergad. ... 11:30

I.J.K. en F.R.G., aha !

Bonaj materiaj kondiĉoj kaj relative malalta aliĝkotizo verŝajne klarigas la sukceson de la 41a Internacia Junulara Kongreso, okazinta en Eringerfeld (F.R. Germanio) de la 22a ĝis la 29a de julio. Partoprenis 430 homoj el 32 landoj, i.a. Kolombio, Japanio, Koreio, Usono, Irano kaj Kanado. Ne nur estis prelegoj pri la kongresa temo "Junulo inter revo, ribelo kaj rezignacio", sed enkondukiĝis en la programo ankaŭ kelkaj novaĵoj: laborgrupoj pri balaj dancoj, lignoprilaborado, kajtfarado, dramimprovizado, k.t.p. allogis multajn homojn. Kulmino de ĉi tiuj nekutimaĵoj estis granda ludfesto, kiun bedaŭrinde interrompis pluvo. Plej ŝatataj eroj estis la vesperprogramoj: teatraĵon "La Kalva Kantistino" de Eugène Ionesco prezentis junaj germanaj esperantistoj kaj plurhoran internacian vesperon plenigis diverslanda ludantaro per skeĉoj, kantoj kaj dancoj. Elstaris tamen la tutunua Esperanto-rokmuzika vespero, dum kiu muzikis la skandinava grupo Amplifiki kaj La Mondanoj el Berlino. Ke Flandrio ne nur liveras al la Esperanto-Movado la prezidanton de UEA, sed ankaŭ la inter la movada junularo plej popularan dancon, pruvis la de ambaŭ grupoj komune ludata, entuziasmiga kaj preskaŭ duonhora versio de "La Bamba", la kisetdanco kiu post la I.J.K. en Leuven firme enradikiĝis kiel neformala programero de junularaj renkontiĝoj. Se ankaŭ vi volas sperti la unikan etoson de I.J.K., sciu jam nun ke en 1986 ĝi okazos en Neurim (Israelo) kaj en 1987 en Krakovo (Pollando).

André Ruysschaert

Raporto de la prezidanto

Post dujara prezidanteco necesas ne nur rigardi post si, sed ankaù rigardi la estontecon. Mi akceptis la taskon precipe pro sentimentaleco: estus bedaùrinde ke okdekjara grupo malaperas. Kvankam la grupa vivo ne tre interesis min (ĝi ŝajnas al mi "necesa malbono" de nia movado), mi tamen klopodis laùeble organizi regulajn kunvenojn. "Paco kaj Justeco" ricevis ĉiujn numerojn de tiu ĉi "Novaĵletero". Mi esperis ke reciproka ĉeesto de la aktivecoj gvidos al pli bona interkonatiĝo, poste kunlaboro, kaj fine, senproblema unuiĝo. Tamen, evidentiĝis ke la informoj nur vojaĝis en unu direkto kaj, plie, verŝajne ne estis transdonataj. Aliflanke, mi konstatis ke kelkaj malnovaj membroj de la Bruĝa Grupo Esperantista opiniis ke venis la momento por ĉesi la aktivecon (ĉar ja estis iu kiu okupas pri la grupo).

Problemo de nia grupo estas ke parto de nia membraro estas maljuna kaj nu plu emas forlasi la domon, kaj ke alia parto loĝas dise en la lando. Iuj vidas solvon en organizo de kurso; tiel povus veni junaj membroj. Tamen, jam ekzistanta kurso allogas nur malmultajn lernantojn; ĉu indas fari duoblan laboron por duona lernantaro ?

Kiel reagas la publiko al ekzisto de du grupoj en unu urbo ? Oni ne komprenas, kaj post klarigo plejofte preferas ne intermiksiĝi, do ne okupi pri Esperanto. Eĉ la urbaj instancoj ne plu komprenas la situacion.

Fine estas la malfacilaĵoj de niaj aktivaj membroj. Kelkajn ni devigas al duobla membreco. Aliaj ne povas plene ĝui la lokan Esperantistan vivon. Plej grave estas ke ni perdas multajn laborhorojn, kiuj ne nur ne utilas, sed malutilas al la E-movado. Mi ankaù menciu la financajn sekvojn.

Mia konkludo estas ke mi ne plu daŭrigos agadon nal-utilan al mia movado. Pri la estonteco de la grupo decidu la eksterordinara ĝenerala kunveno. Ni nepre ne plu direktu nin al ne-esperantista publiko.

Roland Rotsaert

## Esperanto-Jongerenweekeinde

Het traditionele FLEJA-weekeinde gaat dit jaar door op 8, 9 en 10 november in het domein Merkenveld te Loppem. Het voorlopige programma voorziet o.m. in een bezoek aan Brugge, een voordracht over avant-gardetheater in Polen en een optreden van de Poolse Esperanto-zanger Roman Bura. Daarnaast wordt ook de nodige tijd vrijgehouden voor het tonen van dia's over het voorbije IJK in Eringerfeld en zal er uiteraard kunnen gezongen en gedanst worden (zowel de bamba, disco- als volksdansen zijn tot een traditioneel onderdeel van het FLEJA-weekeinde uitgegroeid). Verdere inlichtingen bij André Ruysschaert, Ganzestraat 89, 8000 Brugge (tel. 050/34.14.69). Inschrijvingsformulier hiernaast.

## Al la partoprenontaj al venontjara UK en Ĉinio

Sur le nederlanda televido kaj radio startas en februaro 1986 kurso pri ĉina lingvo kaj kulturo. Informojn donas Teleac, Postbus 2414, NL-3500 GK Utrecht.

o o o o o o o

De tekeningen van de laatste bladzijde bestaan ook in de vorm van prentkaarten. Een reeds van 6 kost 60 frank en kan besteld worden bij de boekendienst van de Vlaamse Esperanto-Bond.